# Novjorka Prismo

Numero 126 — Septembro 2003


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia septembra kunveno.*

DATO: Vendredon, la 19-an de septembro 2003, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, A - 2nd floor, NYC
(between Bowling Green and Exchange Place)
← NOVA LOKO!

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – **Raportoj pri la someraj kongresoj Esperantaj.** ★

**NOTE:** Beginning September 19th ESNY will meet the third Friday of each month at the **new headquarters of the UFT** (United Federation of Teachers):

**50 Broadway, A - 2nd floor, NYC** (between Bowling Green and Exchange Place)

**Directions:** 1, 9, N, R, W train to Rector Street, walk South and East; or 4, 5 train to Wall Street, walk South; or J, M, Z train to Broad Street, walk South and West. ★

## Nia somera pikniko

Sabaton la 28-an de junio (pluvis la tutan antaŭan semajnfinon), 13 samideanoj piknikis en Riverbank State Park, apud la Rivero Hudson ĉe 137-a Strato. La vetero estis bela kaj oni sidis je longa piknika tablo sub arboj apud la granda elipsa kurejo. Ĉeestis gasto el Kolombio, Luís Castro, survoje al la Jarkongreso de ELNA en Boston. Oni manĝis fruktojn, sandviĉojn, k.t.p., ludis frizbion kaj grimpis la arbojn, esploris la parkon, kaj babilis interalie pri someraj planoj. Oni pasigis tie la tutan posttagmezon de la 11-a horo atm ĝis post la 6-a horo ptm, kiam oni kune promenis al la metroo. ★

– *Jim MEDRANO*



*Luís Castro salutas.*



*Membroj de ESNY dum la pikniko en Riverbank State Park.*

## Someraj renkontiĝoj: WaveUFO

Inter la 10-a de majo kaj la 31-a de julio 2003 estis strukturo ene de la publika spaco ĉe IBM Plaza, ĉe 590 Madison Avenuo ĉe 56-a Strato. La strukturo aspektis kiel aŭ okulo aŭ fiŝo aŭ kosmoŝipo. La broŝuro priskribas la aspekton kiel "guto de akvo, ŝvebante je kelkaj futoj super la tereno." La strukturo nomiĝas "*waveUFO.*" (En Esperanto: "*ondoNFO,*" *ondo-Neidentigita-Fluganta-Objekto.*)

Dimanĉon, la 6-an de julio, Stuart Green, Ŝijimin, kaj Semra Çelik eniris la strukturon. Ni grimpis al la enirejo per ŝtuparo, eniris, kaj kuŝis sur la plankon. Ni estis kunligitaj kun la maŝino per dratoj. Ni vidis sep minutan montraĵon, projekciita sur la plafonon. Oni reklamacis, ke parto de la projekciaĵo estis formita laŭ niaj cerbondoj. La sperto estis tre malstreĉiganta. ★

– *Stuart GREEN*

(*Someraj renkontiĝoj* daŭras sur paĝo 2.)

# Someraj renkontiĝoj

*(daŭras de paĝo 1)*

## WaveUFO at IBM Plaza



Ŝijimin, Stuart, and I were there around 1:30 pm (6-July). The Public Art Fund is presenting an exhibition by Mariko Mori called *WaveUFO* May 10 to July 31, 2003. Volunteers who wanted to experience the "Real



*Stuart, Semra kaj Ŝijmin pretaj eniri WaveUFO.*

Time Brain Wave" were lined up for a real cool show. The fiberglass statue (seen in the picture) has 3 seats. Each viewer wears a set of electrodes, which gather brainwave data. This information is instantly transformed into visual imagery, in real time correspondence with the actual activity of the brain, and projected onto the screen. The whole show lasts about 7 minutes.

After the tour in our brains, we had a general chat mostly in Esperanto, and left around 4:30 pm. ★

– *Semra ÇELIK*

## Leĝe Blonda

La 25-an de julio, 6 esperantistoj ĉeestis prezentadon de la komika filmo *Legally Blonde*. Antaŭ la filmo, oni babiladis pri pluraj aferoj, inkluzive la grandan elekton de senpagaj someraj aferoj en Novjorko. ★

– *Thomas ECCARDT*



*Membroj de ESNY antaŭ la filmo Legally Blonde ĉe Riverflick.*



## Esperanto Kafejo

La 3-an de aŭgusto mi, Tomaso Leong, kaj Stuart Green manĝetis kaj trinkis en la Cafe Esperanto ĉe MacDougal Street. Post nia babilado, ni piediris al Washington Square. Survoje kaj en la parko, pluvis kaj ĉesis, pluvis kaj ĉesis, sed bonŝance ni trovis



*Tomaso Leong, Stuart, kaj Tom Eccardt ĉe Esperanto Café.*

ŝirmilon kaj malmulte malsekiĝis. Post kelkaj minutoj la ĉielo klariĝis kaj ni hejmeniris. ★

## Vintraĝardeno

La 15-a de aŭgusto estis la fino de la elektromankego, kaj nur mi biciklis al la Winter Garden.

Tamen, la sekvan semajnon, mi reinvitis ĉiujn, kaj pli ol dek homoj tien iris je la 22-a. Ni spertis tre interesan babiladon, kaj ni klarigis pri Esperanto al kelkaj ne-konatuloj. ★

## La Dilemo de Emo

La 9-an de julio, 12 esperantistoj kaj familianoj kunvenis ĉe la restoracio Emma's Dilemma ĉe Park Avenue South. Inter la grupo estis la muzikisto Kimo (el Danlando) kaj Luís Castro (el Kolombio kaj Kanado), kiuj vizitis Novjorkon post la ELNA kongreso en Bostono. ★

– *Thomas ECCARDT*



*Gastoj Luís Castro kaj Kimo Henriksen kun membroj de ESNY ĉe Emma's Dilemma.*

## Kolumbia Universitato

La 7-a de septembro estis belega tago, kaj pli ol dek esperantistoj neformale kunvenis antaŭ Uris Hall ĉe Columbia University. Ni piknikis kaj babiladis dum almenaŭ 2 horoj en la paca kampuso. ★

– *Thomas ECCARDT*




# 10-a Internacia Semajnfino Esperantista en *Okemo Mountain Resort*, Ludlow, Vermonto, Usono

**De la 11a ĝis la 13a de oktobro 2003 (Dank-Festo en Kanado, Kolumbo-Festo en Usono)**

(Informo de la Esperanto-Societo Kebekia – *http://www3.sympatico.ca/esperanto/*)

Okazos denove aŭtuna renkontiĝo en Okemo, Vermonto. Dum la pasintaj jaroj, tiuj kiuj venis vere ĝuis la belegan montar-gastejon, la amikecan etoson, la internaciecon de la ĉeestantaro kaj la varian programon.

## Kio estas I.S.E.?

La Internacia Semajnfino Esperantista celas kunigi esperantistojn el nordorienta Ameriko dum tritaga semajnfino. Organizas ĝin la Esperanto-Societo Kebekia lige kun aliaj esperantistaj asocioj kaj kluboj en Usono.

## Programo de I.S.E.

- Komenciĝo je la 14a horo sabate, la 11an de oktobro.
- Finiĝo je la tagmezo lunde, la 13an de oktobro.

La programo estas plurnivela, kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj diversaj prelegoj por la lertuloj. Vi povas ekskursi en la naturo aŭ al apuda urbeto Ludlow. Sabato okazas la amuza interkona vespero kaj dimanĉo festa komuna vespermanĝo. (Ĉiuj kunportas ion por dividi kun aliaj). Sekvas kultura vespero kaj vi estas bonvena prezenti ion.

Se vi intencas partopreni la kursojn aŭ prezenti ion dum la semajnfino, bonvolu informi nin, unu monaton antaŭe tiel ke ni povu akurate finplani la programon.

## Kiu venas?

Dum la pasintaj I.S.E., 40 ĝis 80 esperantistoj ĉefe el Ontario, Kebekio, Nov-Anglio, Nov-Jorkio, sed ankaŭ el Britio, Germanio, Svisio, kaj eĉ el Japanio partoprenis entuziasme. La plej juna aĝis 2 kaj la plej aĝa 80!

Invitu viajn familianojn kaj konatulojn ĉar la gastejo situas en tre bela montara regiono kie ili povos ripozi dum vi esperantumos. Venu ĝui internacian amikan etoson. Bonvenon en Esperantio!

## Loĝado por I.S.E.

NB: Ĉiuj prezoj indikitaj estas en usonaj dolaroj

Vi havas du alternativojn por loĝado: loĝi aŭ ĉe Okemo Mountain Resort, kie okazas I.S.E., aŭ en apuda Ludlow.

### LOĜI ĈE OKEMO

Okemo estas belega skiferiejo. Ĉiu apartamento ĉe Okemo havas plenekipitan kuirejon (vi devas alporti nur manĝajon). La apartamentoj ĉe Kettle Brook kaj Winterplace/Ledgewood ankaŭ havas manĝejojn kaj salonojn kun kamenoj (kun brulligno) kaj televidiloj (kun vidbend-aparatoj). Se vi preferas loĝi ĉi tie, vi povas fari viajn aranĝojn rekte kun Okemo, aŭ vi povas kontakti nin pri gruparanĝoj.

### Kiel mendi?

Vi povas kontakti la feriejon (angla-lingve) por scii la prezojn por apartamentoj ĉe Okemo kaj ricevi informilon.

- telefone: 1-800-78-OKEMO
- retpoŝte: okemo@ludl.tds.net
- sur la TTT: *http://www.okemo.com/survey.html* (formular-kongrua TTT-legilo bezonata)

### Gruparanĝoj

Se vi ŝatus dividi apartamenton kun aliaj esperantistoj, vi devas mendi lokon antaŭ la 7a de septembro.

**Normand Fleury** (Esperante, france, angle)
respondilo/faksilo: +1 (514) 272-0151
retpoŝto: esperanto@sympatico.ca

### LOĜI EN LUDLOW

Vi havas tri elektojn:

1. Loĝi en junulargastejo: The Trojan Horse, 15$US nokte, 802-228-5244 THLODGE@aol.com
2. Loĝi en motelo/hotelo: estas dekoj de gastejoj en Ludlow. La plej malmultekosta, kiun ni povis trovi kostas ĉirkaŭ 60$US nokte.
   Jen parta listo:
   Timber Inn Motel, 802-228-8666
   Inn Towne Motel, 800-228-8188
   Cavendish Point Hotel, 800-438-7908
   Happy Trails Motel, 802-228-8888
   Plia listo . . .
3. Aliaj iuservoj:
   Okemo Valley Hospitality Association
   Ludlow Chamber of Commerce, P.O. Box 333, Ludlow, VT 05149, Usono
   Strictly Rentals, 800-776-5149

## Kotizoj

Ordinara: 25$US

Rabatita: studentoj, senlaboruloj, emeritoj: 10$US

La kotizo estas pagebla surloke je via alveno, tamen ne forgesu aliĝi tuj!

## Kiel atingi Okemon?

### PER AŬTO

Alklaku tien ĉi por mapo kaj direktoj (en la angla). Kiam vi atingos Luldow, petu la vojon por atingi "Okemo Mountain Resort".

### PER AVIADILO

La plej bona flughaveno estas verŝajne Bradley International Airport en Hartford (Connecticut).

Tie, lueblas aŭtomobilo, kaj oni povas veturi rekte norden laŭ granda ŝoseo al Ludlow. La vojaĝo inter Hartford kaj Ludlow estas proksimume 2,5 horoj.

Ekzistas flughavenoj ankaŭ en Burlington, Vermonto (tiu estas malgranda kaj malpli oportuna) kaj Albany, Nov-Jorkio. El tiu lasta flughaveno oni bezonas nur iom pli ol du horoj por iri al Okemo.

Por pli da informoj pri aviadila alveno, bonvolu kontakti Vilĉjo Harris

## Kiel aliĝi?

Se via TTT-legilo ne formular-kongruas, b.v. alklaki tien-ĉi por sendi la detalojn retpoŝte.

Via kompleta nomo: ______________

Nomo(j) de kunaliĝanto(j)
(indiku ankaŭ se venos bebo aŭ infano):

______________
______________
______________

Via paper-poŝta adreso:

Adreso: ______________

Urbo: ______________

Ŝtato aŭ provinco: ______________

Lando: ______________

Via telefon-numero (ne forgesu la regionan kodon): ______________

Via retpoŝta adreso: ______________

Mia lingva nivelo estas _baza _meza _alta

Ĉu vi kontribuos al la programo? _Jes _Ne

Mi havas aŭton kaj mi pretas veturigi iun el mia (urbo/regiono) __ Jes __ Ne

Ĉu jes? Bonege! Kiel? ______________

Ĉu vi jam ĉe estis antaŭaj I.S.E. en Okemo? __ Jes __ Ne

Aliĝo je ordinara kotizo: __ Jes __ Ne

Aliĝo je rabatita kotizo: __ Jes __ Ne

Ne necesas sendi la kotizon antaŭe sed necesas ALIĜI FRUE.

Eblas aliĝi faksile je: 1-514-272-0151
kaj ni akceptas ankoraŭ poŝtajn aliĝojn je:

ESK-OKEMO
6358-A, rue de Bordeaŭ
Montréal, Québec
Canada, H2G 2R8 ★

# Anoncoj

## Julius Balbin foriris

Je la fino de la somero, Julius Balbin kaj lia edzino Helena transloĝiĝis al Belgio. Julius estas verkisto de multaj poemoj en Esperanto. Antaŭ jaroj li regule ĉeestis niajn klub-kunvenojn. Fakte, li estis inter la fondintoj de nia klubo. Bonan vojaĝon, Julius kaj Helena, kaj ĝis revido! ★

– *Tom ECCARDT*



*Julius Balbin dum ESNY kunveno en 1998.*

## Laste vizitis

La 8-an ĝis la 11-a de julio restis ĉe ni Kimo kaj Villads Henriksen, patro kaj 9-jara filo, el Danlando. Kimo estas muzikisto, akordionisto, kaj ege ŝatas la 'Blues.' La du, kaj la patro kaj la filo, ambaŭ estas denaskaj esperantistoj. Ili jus antaŭe partoprenis en la Jarkongreso de ELNA, en Bostono, kie Kimo prezentis muzikon. En Novjorko ili multon vizitis, i.a. la Statuon de Libereco kaj Central Park. Ni mem akompanis ilin al Central Park, kie ni manĝigis la anasojn en la lago kaj vizitis la statuon de Hans Christian Andersen kun La Malbela Anasido. Ili ankaŭ vizitis *waveUFO* kaj partoprenis en la 5-jara naskiĝtagfesto de nia filino Emily, ĉe Victorian Gardens, ankoraŭfoje en Central Park. ★

– *Jim MEDRANO*



*Kimo ludas la 'Blues.'*



*Villads sur la Malbela Anasido en Central Park.*

## Sendependa filmo

Antaŭ kelkaj monatoj mi tradukis dialogon de parto de sendependa filmo al Esperanto. Ĝi nomiĝas *The Middle Voice* kaj vi povas vidi iom de ĝi ĉe *www.upandoverproductions.com*. ★

– *Tom ECCARDT*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Septembro 19**

**ESNY KUNVENO**
**Raportoj pri la someraj kongresoj Esperantaj**
*Vendredon, 6:30 ptm at UFT*

**Oktobro 5**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 127)

**17**

**ESNY KUNVENO**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, A - 2nd Floor, NYC
(between Broadway and Exchange Place)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Letero al *Prismo*



Al membroj de ESNY
Saluton gesamideanoj!

Al mi plaĉis via E-paĝo, tial mi sciigas vin pri tio, ke mi tradukis en Esperanton libron *Unuetaĝa Usono*. Ĝin verkis du mondfame konataj rusaj humuristoj post kvarmonata vojaĝo al via bela lando en 1935. En Usono oni ĝin eldonis sub titolo *Little Golden America*.

Ĝi troveblas en <*www.vladimir-okc.hotbox.ru*> kaj, mi esperas, ĝi sendube plezurigos vin dum legado, des pli, ke Novjorko estas ofte menciita tie. Min interesas viaj impresoj pri ĝi. Estus bone, se anoncon pri mia traduko vi aperigu en *Prismo*. Ĉion plej bonan sincere deziras al vi. ★

– *Vladimir OKC; Moskvo, Rusio*

**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Korespondа Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Neil Blonstein (212) 663-2020

**Novjorka Prismo**
Numero 126 – Septembro 2003
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com